# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ

### 3.6. Fabela komponaĵo pri la mateno (unua parto)

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

El la libro *Gooŝ la ĉelisto* de Miyazawa Kenzi,
elsendita je 2003/07/12, legas Barbara Pietrzak.

<u>Taskoj:</u>

***1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj:***

a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr12a.mp3

aŭ

b) en formato RealAudio:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr12a.rm

***2) Bonvolu rigardi la subajn demandojn kaj poste denove aŭskulti la elsendaĵojn. Post tio provu respondi al la demandoj***:

1. Kia estas la vetero?
2. Ĉu la gardostaranto estas homo? Kion ĝi faras? Kie ĝi deĵoras?
3. Kiu alia soldato alkuras? Kien ĝi iras?
4. Kion la gardostaranto inspektis ĉe la heroldo? Ĉu la rezulto de la inspekto estas kontentiga?
5. Kia fariĝas la nebulo en la granda filika arbaro?
6. Kiu bruo komencas aŭdiĝadi en la arbaro?
7. Kio okazas al la gardostaranto?
8. Kiuj venas, kiam la gardostaranto endormiĝis? Kion ili faras? Kial ili subite haltas?
9. Kia estas la nekonata domo? Ĉu la infanoj certas, ke temas pri domo? Kion ili decidas fari por certiĝi?
10. Kiel reagas la dormetanta gardostaranto?
11. Konsciinte, ke la infanoj pravas, kion ĝi petas de ili?
12. Kien ili direktiĝu por raporti pri la mirindaĵo?
13. Kion signifas « 25N 0.06E » (devus esti « 25°N 0.06°E », 25 gradoj norde kaj 0.06 gradoj oriente)?

**Demandoj pri la teksto (pripensado)**

14. Kio estas la roluloj de ĉi tiu fabelo?
15. Trovu la esprimojn, kiuj montras, ke la roluloj vivas en miniatura mondo.
16. Kiu natura paralelo ekzistas inter formikoj kaj militistoj?
17. Trovu vortojn de la militista leksiko?
18. Kial la gardostaranto petas de la infanoj, ke ili portu la informon pri la mirindaĵo ĝuste al la budo pri ter-mezurado?
19. Por kio servas termezuristoj en militistaro?
20. La aŭtoro uzas la esprimon « snidera bajoneto ». Serĉu, ĉu « snidera » troviĝas en PIV. Elpensu, kio povas esti la signifo de tiu esprimo (serĉu similajn en naciaj lingvoj).
21. Serĉu en atlaso la lokon kun koordinatoj « 25°N 0.06°E ». Kio strangas?

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net kaj ni sendos ilin (almenaŭ tiujn, kiujn ni mem scias ☺).